

PENSEO

N-ro 386

dec. / 2023

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <http://www.elfino.cn/penseo/penlisto.htm>

Sten Johansson (svedio)




Sezona soneto

La limon inter vintro kaj aŭtuno
mi sekvis promenante sen motiv'
pensante pri la fluo de la viv'
laŭ vojo de l' pasinto al la nuno.

Sur la ĉielo malĉeestis suno
kaj sur la glita pado de l' dekliv'
folioj mortis laŭ la perspektiv'
de verdo tra oranĝo ĝis la bruno.

Finfine iam ĉesos la promeno,
ĉi vivo estas nura kvaranteno,
neeviteble sekvos ĝia fin'.

Do sub la defalonta foliaro
min trafis la konklud' de l' kalendaro
ke eble jam pasintas la kulmin'.



Ángel Arquillos (Hispanio)



Sur la blanka litotuko

Sur la blanka litotuko
mi trovis veluran kison;
ŝi ĝin lasis,
ekveturinte kun urĝo.

Estis frue,
kiam ankoraŭ la suno
duondormis,
kaj la malhelo... griziĝis
iĝante luma mateno.
Mi ploretis, sed tuj poste
mi ridetis kun kolero
kaj senbrue mi kriegis
rigardante la ĉielon,
kiu jam sin montris blua
kaj malaperis la lumon
de la radianta stelo.
—Ĉiopova, kara Dio!
tra la senlima universo
ŝi vagadas,
bonvolu, ŝi lasis kison
sur la litotuko blanka.
Ne malfermu la pordegon,
ĉar mi bezonas redoni
al ŝi la veluran kison,
kiun ŝi lasis kun urĝo
apud blanka kap-kuseno.”

Moissey Bronshteyn (Rusio)



Nun blovas malfavora vento,
milita vento, ne hamsina,
en la Proksima Oriento,
por mi, nature, tre proksima.
Pro fiaj scioj aŭ nescioj
de vera kerno de l' problemo
bobelas sentoj kaj pasioj,
kaj mankas ajna komprenemo,
kaj mankas emo vivi pace,
kaj hato fortas ambaŭflanke—

ĝi estas tre danĝera pad' se
 ekkredis ĉiuj en elan' ke
 sorante al kruelaj pintoj
 oni konservos la honoron...
 Por la senkulpaj pereintoj
 mi metu mian floron.

Neĝo falis finoktobre
 bruska, densa, nevokita.
 Malfacilas agi sobre
 en la spaco neĝkovrita.

Ie salvas nun kanonoj –
 tio eĉ pli suferigas –
 ĉu ekzistas plia bon' ol
 paco, kiu mondon ligas

per helpemo kaj kompreno,
 amo kaj mizerikordo.
 Estus beno urĝa veno
 de la paco. Mia kor' do

penas agi iel tiel,
 kiel ne plu povas korpo,
 tamen, bedaŭrinde, mi el
 mia doloranta koro

vane nun admonojn ĵetas
 al krueliĝanta mondo,
 homoj fajfe mokridetas,
 ne efikas la admon', do

trankviligu nin konjako,
 ni kun glaso pace spiros
 ĝis horora bombatako...
 kiu nin ne preteriros.

Kial al mi jukas la nazo?
 Ĉar jam glimas en la vespero
 tostoleva taŭĝa okazo –
 Roŝ-ha-Ŝana venas al tero.

Vere, mi ne estas baptita,
 sed min vokas la tradicio,

tostas mi pro la kaŭzo rita
 je efektiviĝo de ĉio,

kion volus homo normala:
 ke fekunde floru la kampo,
 malaperu ardo batala,
 sed fortiĝu ardo de amo,

ke la mond' plu vivu sekure,
 ke ne manku distro nek plado,
 kaj mi kredas, ke ja nature
 vi kuntostos. Ek, kamarado!

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



*Al mia karega filino, kiu naskiĝis aŭtune kaj
 tre ŝatas aŭtunon, kaj al ĉiuj filinoj dediĉita!*


Mi preĝas Dion pri ĝojo via,
 Pri sano, verda voj', rilato varma,
 Pri tio, ke pli ofte la rideto
 Lumigu la vizaĝon vian ĉarman.
 Mi petas sunon sunradii vian vivon,
 Apude nur amikoj bonaj estu,
 Kaj ne vundigu koron ies agoj, vortoj,
 La rev' alproksimiĝu kaj por ĉiam restu.
 Mi petas aŭtunon pri la bunta festo,
 Pri tio, ke forigu fortajn pluvojn, ventojn,
 "Folio lasta" estu la komenco
 Komenc' de renkontiĝ', de belaj sentoj.
 Se iĝu vortoj — florbukedo,
 La bondeziroj — la koliero el la perloj,
 En vesto de folioj oraj
 Vi estu plej feliĉa kaj plej bela!

La PERLO kaj ŜAŬMO

(fablo)

La ŝaŭmo brila surmare videblas,
 Ĉu Perlo radias? Momente ni pensas,
 Sed en marprofundo la Perloj troviĝas,
 Interne nur vera trezoro naskiĝas.
 Jen kiel la Ŝaŭmo rakontis pri ti',

—Sur Mara supraj' lok' forestas por vi
 Se estas la Perlo, ĉu estas vi Perlo?
 Mi estas trezoro de Maro-Patrin'.
 Mi estas videbla surface de akvoj,
 Kaj brilas,
 kaj ĝuas la vivon senfin'...
 Sed ĝia ĝuado ne estis longtempa,
 Disiĝis la ŝaŭmo pro forta marvento,
 Sur Mara supraĵo eĉ spuro ne restis...
 Sed Perlo el la profundec' akirita,
 De mano al man' kun admir' transdonita,
 Diradis la homoj— Jen vera trezor',
 De Maro-Patrin' estas sola ĝi glor'.
 ... Ekzistas la homoj al ŝaŭmo similaj
 En maro de vivo surfacen alvenas,
 Kaj kiom da perloj en la profundeco
 La gloron de ili la ŝaŭm' forprenas.



Tradukis el Hovhanes Ŝiraz, famega armena
 poeto (1914-1984)

Wally du Temple (Kanado)



Respondo al 'Ree pri Paco'

Pri tio ja emas li temi
 ke li jes emas emi
 Pri l' paco jes poemi,
 Jes ja li certon havas,
 ke evoluo forlavis militon
 stulton kaj frenezon
 Ĉar kosmo emas krei el nukleoj
 formoj simplaj ĝis pli komplikaj
 ĝis biomuloj plenkonsciaj-
 Akuŝoj evoluas ĝis
 Kosmogenezoj
 Triumfos post la agoni'
 jes vi, jes ni
 per kor-paca civilazaci'
 per Amo kaj ama verso

laŭ Himno d'el Universo

de Teilhard de Chardin

 'REE PRI PACO'
de Jiri Korinek 1986
 "Poemaro por Paco" de UEA
 Pri tio ja ne volas temi,
 ke ni ne emus emi
 pri l' paco plu poemi,
 sed se ni certon havus,
 ke tiaj versoj gravus,
 el ies mensoj lavus
 la krimajn kaj sordidajn
 pensojn profitavidajn,
 la planojn stel-militajn
 el stulto kaj frenezoj
 ŝargantajn nin sen ĉeso
 per sia nigra pezo,
 Vi, kiuj sur monsakoj sidas
 ĉu vi ne tion vidas:
 ĉe l' venk' nuklea ke profitas
 nek vi, nek ni—
 triumfus nur la agoni'
 de l' homa civilizaci'



Papos Nascentes (Brazilo)



TRANS AŬ

 en mia viv' ĉu sufer'
 aŭ fine blovo?
 vivo ĉu unuig' aŭ puno?
 ĉu malbono aŭ uno?
 en ĝi kiom pli kosto
 kiom pli masko?
 kiu flanko estas malamo?
 kiom podio scenejo
 kie falsajon mi ludas?

kiu tirana flanko
 fluecon min forprenas
 vivon movon forprenas
 stagnon trudas?
 kiam mi elangulos
 kaj kantos kantoblovon?



Knab-tempo

eble malvarme
 temp' maldilatas
 mallongiga kunŝova knab'
 kuras konfuza rapida agitata
 tempomanka por ĉio
 tempomanka por mar'
 tempomanka por am'
 tre malvarma tempo
 tre malvarma rigardo
 mallongiga rapida agitata

Ardo (Ĉinio)



Komenco de vintro

Alternas la sezonoj kun frosto aŭ varmo
 Por ĉiam mi esperas, ĉio estu ĝojo.
 En vento dancas gaje falfolia svarmo,
 jen bela krizantemo floras ĉe la rojo.

(8 nov.2023)

bela floreto
 en val' senhoma pompas,
 jen kor-kvieto.



Jadranka Miric (Serbio)



Grakas korvoj

Pluvas ekstere.
 Noktiĝas frue.
 Morta foliar' surtere.
 Laŭ longe de tombo via
 glitas pluvgutoj
 samkiel sur vizaĝ'mia
 ŝveligitaj larmoj,
 pro mondo kirlanta milite!

Saliko

Duone flava
 kun pendinta branĉar'
 neniel pava,
 sub piedoj morta salikfoliar'.

Malgajas Saliko
 ĉe trotuaro urbo-betona
 en brakumo de vento fortsona,
 Solas ĝi sen iu ajn amiko.

Amo neniam mortas

Vi pruvis al mi
 ke bonkoreco
 kaj solidareco
 iun tagon revenos al ni
 kun bonemoci'.

Vi konvinkis min
 ke espero estas pli ol
 la lasta ŝanco-afer'.
 Ĉar kun vi mi forgesis pri sufer'.

En frua aŭtuno
 min mezaĝulon, varmigas suno.
 dum imagon donacas Luno.
 En natur', en mia patrujo
 reffloras ĉerizujo,
 Amo

Brunaj okuloj viaj
 plenaj de amoestimo
 ridis rigardante min.
 Miaj manoj sen timo
 forte etendiĝis por brakumi vin.
 Tiam vi malfermis la okulojn
 por ke viaj lipoj kisu la miajn!

Erika Godó (Hungario)



La folioj de la arboj

La folioj de la arboj malrapide falas,
 ili brilas ruĝe kaj ore sur la tero.
 La folioj silente dancas en la vento,
 kiam mi marŝas, la sekvfoliaroj faras bruon
 sub miaj piedoj.

Ili falas malrapide kiel bela mola pluvo,
 tapiŝo el stoplo estas nun sternita sur la
 pejzaĝo.
 Ili trankvile adiaŭas la pasintan someron,
 kaj ili pentras la stratojn per aŭtunaj koloroj.

Ili flustras la pasintecon, la ŝanĝon de vivo,
 ke nenio restas por ĉiam en la mondo.
 Sed printempe la naturo ĉiam renovigas sin,
 nova vivo komenciĝas sur la branĉoj de la
 arboj.

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Jam mateniĝas.
 La kameno forbrulis.
 Mateno brilas.

Brulanta suno
 milde karesas l' grenojn.
 Naskiĝos pano.

Tuja sunsubir'
 kaŝrigardas sur rokoj.
 La tag' finiĝas.

Belpendosakon
 la laca tago portas.
 Vagant' soleca.

Sur arbarvojo
 kunikleto elsaltis.
 Ĉasist' atendas.

Aŭtuna ĉiel'.
 En la sino de panjo
 katid' katzumas.
 Vesperkrepusko
 ĉiela brilado. Mi
 songas la stelojn

En dezerta hejmn'
 sur sojl' katido sola.
 Mankas fajrujo.
 Noktomeza blus'
 surkovras mian liton.
 Taso malpenaj.
 Odor' de rozo
 en Paradizĝardeno.
 Eva flirtadas.

Elena Popova (Bulgario)



Aŭtuna bildo

Tri arboj sur la placo, kisitaj de la suno.
 La unua arbo de paradizo, kun brilantaj oraj
 folioj sude kaj verdaj norde. La tuta arbo
 tremas: "Mi estas juna! Mi estas bela! Amu
 min!..."

La dua apud ĝi, kun folioj de malhela oro,
 ĉirkaŭita de bruna krono, kaj sur ĝia pinto-
 verda tufo krias: „Mi ne rezignas! Ne
 rezignas!..."

Kaj la tria en linio, kun malhelaj nuancoj de
 koloroj, humile flustras: "Ĉio estas pasema!
 Ĉio!..."

Tri arboj ĉirkaŭitaj de lumo.
 Aŭtuno-pentristo ĝuas siajn kreaĵojn.

Nikolao Hohlov

Nia lingvo

Nia lingvo ĉerpu belon el la amo,
Belon, oferitan de la gaja kor' —
Estu ĝiaj lumaj vortoj la balzamo,
Kiu viŝas sulkojn de la frunto for.

Nia lingvo ĉerpu forton el la kredo
Je la unueco de la homa gent',
Kiu ĝin akceptos danke por heredo
Kaj ekuzos iam en paciga sent'.

Nia lingvo estu ilo de la ago,
Kiun kreas vole bono aŭ malbon':
Viva energio — sed ne sarkofago,
Lerte elĉizita el rigida ŝton'.

Nia lingvo estu lingvo, sed ne ludo,
Nek maŝina uzo de la radikar'
En ŝablonaj dogmoj de la sekta
prudo,
Kun ridindaj trajtoj de l' enua star'.

Tradukis



Hans-Georg Kaiser

(Germanio)

&&&&&&&&

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Kruta monto

La vivpado sternas sin ne plata,
ni defias ĝin kun fortfervoro.
Revo ne ankoraŭ estingata
estas jen kaŝata en la koro.

Ni deziras brave kun sopiro
venki la obstaklojn ja decide.
Grimpu ni krutmonton kun aspiro,

cele l' kreston gloran jen konfide.

Espereble venos baldaŭ l' tago,
mornoj kaj mizeroj jam forestos.
Ne plu ni suferos pro fuĝvago,
kaj agrable en hejmloko restos.

Devas ni defendi pacon pene,
por ke bluu la ĉiel' serene!

Same kiel via tenereco

Tiu tago en la monato de la jaro
aspektis kiel frakasita jen vizaĝo.
Estis malfacile adiaŭon diri,
oni lasis ĉion nur foriri.

Estis tio ne facila la afero,
tamen ni ne ploris tra elteno,
lasante ĝin alveni en leĝero
kaj forpasi bone kun la beno.

Jaro post la jaro ĝis hodiaŭ,
mi neniam ĉesas sopiri ankoraŭ,
memorante al vi kaj la pasinteco.

Espereble blovas ree mara vento,
nur por la manforma surfo en prezento,
tiu ŝajnas same kiel via tenereco.

Tradukita el la ĉina lingvo

Kuirfumo leviĝanta denove

Mi vidas kuirfumon leviĝi denove,
dum krepusko flagras super la tero.
Mi demandas kuirfumon prove:
kien flosas vi nun kun leĝero?

Sunsubiro estas poezia,
kaj krepusko ankaŭ belradia.
Kvankam ili belas kun brilgloro,
tamen nur troviĝas vi en mia koro.

Mi vidas kuirfumon leviĝi denove,
dum vekiĝas mia dolĉmemoro.

Vi fariĝu nubo kun rozruĝkoloro,
kaj flugu en mian sonĝon brizblolve!



Tradukita surbaze de la ĉina amkanto

Germana ŝlagra amkanto: Antonio

Lasu nin eskapi al somero,
mi jam scias kien, kun espero
— al Antonio.
Finfine denove sunbrila pursfero,
dum nur kelkaj semajnoj en libero
— kun Antonio.
Dolĉa vivo ĉe nokteca blua maro,
kaj gitaroj ie sonas ĉi-tien sen baro,
ni kondukas tiel kvazaŭ l' vivo estus la
somero.

Ni ĉiuj denove estos tie baldaŭ,
pli proksime al la suno ankoraŭ.
Sendube precize scias vi,
via “*amore mio*” mankas tiom al mi.
Ne nur temas pri la ruĝa vino,
sed jam pro vi mem kun korinklino.
Pro “*ti amore*” kaj romantiko,
mi revenas tien en ĉiu somero al l' amiko.

Kun somera vento en la haro,
ankoraŭ vespere en drinkejo de najbaro
— kun Antonio.
Ĝis lunlumo helas super blua maro,
kelkulo estas jam devojiĝinta
— al Antonio.
Tie noktoj estas faritaj el sonĝoj de raro,
lia suno brilas tie tage kaj nokte kun klaro.
Kaj mi ankoraŭ aŭdas lian vokon kun
signalo:

“*Arrividerciĝis venonta jaro!*”.

*Esperantigita surbaze de germana ŝlagra
amkanto: Antonio de Irma Holder.*

Valbona Kolaveri



Mi elfumas pensojn

Pordoklapo post pordoklapo
Rompiĝas l' animo en sangovejnoj
En la senvejna.

Ĝibula tago,
Paroladas
Ankaŭ kun si mem

Per lamaj liberecoj
Mi elfumas
Senvoĉajn pensojn,
Dum mi ardiĝas ene de mi
Por trovi min mem.

Petante
La kvieton sub la ombroj
Kiam mi povas esti feliĉa?

Ambaŭokule

Ambaŭokule
La aŭtuno
Atakis min
Per memoraj fulmoj

Por vin vidi
Por vin havi
Tra luksadaj folioj
De la animo.

Mi baraktas
Vin amante



Elalbanigis



**Bardhyl Selimi
(Albanio)**

El Ĉina Antikva Poezio

Zhou Mi (1232-1298)

Spektado al ondoj

—laŭ melodio *Ĝojo je aŭskultado al pigoj*

Akvo kaj ĉielo kunfandiĝas
per tutaĵ' kristale verda plene.
La rivero kvazaŭ tinkturiĝas
per aŭtuna buntkolor' tutscene.
Tajdoj jen turbulas kiel neĝaj montoj
jen kirliĝas kiel drako tordoĝene.
Vent' rapida levas hulojn
kiel murojn altajn ja ekstreme.

Kelkaj montoj verdaj
ŝajne emas guti en nebulo.
Ĉe la horizonto matenruĝo strias
kiel silk-ruband' humidigita de la hulo.
Blankaj birdoj ĉasas velojn
jen glitantajn foren sur ondrulo.
Ĉe noktfal' ario fluta melodia
nun alŝvebas trans rivera flu-murmuro.

Deng Tan (1232-1303)

—laŭ melodio *Kanto pri pli da sukero*

Post pluvo la serenaj ĉielarkon
spegulas l' akvosurfaco de l' rivero.
Malflus' restigis sablan tavolojon
sur rando borda en blank-apero.
Penetras fride tra la fenestr-gazon
folia la susuro kun leĝero.
La vento okcidenta, ve! blove
ja alternigas dinastiojn kun severo,
kaj min ĝi blovas
al fora loko plena de mizero.

La luksa metropol' antaŭa
jam dezertiĝis jen en malprospero.
Oblikva lum' de l' subiranta suno
prilumas stratojn ĉe vespero.
Hirundoj, kiuj pepas pri la historio,

enflugas kies domon kun libero?
Sovaĝanseroj el la sudo reflugantaj
nur nestas en fragmitej' sub luna helo.

Wang Yisun (?-?)

Cikado

—laŭ melodio *Ĝojo sub la ĉielo*

Palaca knabin' pro rankoro
mortigis sin kun decidemo
kaj aliformiĝis en cikad-fantomon.
Ŝi kaŝas sin jen ĉiujare en ombro
de verda branĉaro en korto.
Ŝi ĵuse faligis larmperlojn sur branĉo
malvarma kaj nun ŝi reflugas
en densan arbaron kaj plore rakontas
pri sia doloro jen ĉe la disiĝo.
Aŭtuna pluveto frapadas fenestron,
alŝvebas tintado de jada pendaĵo,
simile al bela muziko el jada liuto.
La bronza spegul' verdigriĝas
kaj ŝia vizaĝ' jam malgrasas,
sed kial ŝi belas ankoraŭ sen ŝminko?

Kvazaŭe la larmoj de l' bronza statuo
estas forlavitaj senspure, kaj l' pleto
por rosojn enteni ankaŭ formoviĝis,
ja por ŝi ekzistas neniuj roseroj trinkeblaj.
La vento aŭtuna ulule damaĝas
morbeman korpeton de ŝi mizerplena
kaj ŝi ja devas barakti per sia gracilo
en la tumultantaj hommond' kaj naturo.
Ŝi povus sintreni tra kiom da sunoj
subiraj vesperaj en la okcidento?
Ĉemorta ĉirp-kanto des pli ja tragikas
kaj tristas en tonoj mizeraj!
Ĉu ŝi rememoras pri l' suda zefiro
svinganta leĝere vergetojn salikajn?

Novluno

—laŭ melodio *Belaj brovoj*

Leviĝas la novluno malrapide

ĝis super salik-krono.
 Lunlumo bruma enfiltriĝas
 jen inter florojn freŝajn.
 Novlun' inklinas ĉiam al rondiĝo
 el la arkforma lunvizaĝo.
 Virinoj riverencas preĝe por la paco,
 starante sur pado en ĝardeno.
 Novlun' similas al nefinpentrita brovo.
 Verŝajne Chang'e* flugis al la luno
 tiame kun profunda ĝeno de disiĝo.
 Plej admirinde, ke l' novluno pendas
 ja kiel arĝentblana kulvuala hoko,
 per kiu frida noktkovril' hokitas.

Dum jaroj mil luno kreskas kaj malkreskas
 laŭ la naturo. Eĉ hakil' el jado fajne akriĝita
 ne povus ja rondigi l' lunon per haketoj.
 Ankoraŭ restas la homplena banlageto,
 sed ĝi jam dezertiĝis ekster priskribado.
 La regno disrompita dronas en longlonga
 nokto,
 jen soifante je l' lunluma enverŝado.
 En lun' videblas bela ombro de pejzaĝo.
 Maljuna kvankam mi fariĝas, mi ankoraŭ
 sopiras al la regn' en reviviĝ' futura.

**Laŭlegende Chang'e, belulino, post englutado de
 fea pilolo, flugas al la luno kaj vivas tie ĝis nun.*

Elĉinigiŝis



Vejdo (Ĉinio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)

La rivero

—laŭ ĉinesko *Feniksa harpinglo*¹

La river'
 en liber'
 torentas kun sabloter'.
 Rapidflu',

kun laŭtbru'
 kuras maren,
 onde kun sku',
 nu, nu, nu!
 .
 En suna hel'
 ĝi kun fier'
 impetas ja kun leĝer'.
 Ĝi kun ĝu',
 sen detru',
 jen sin lulas
 en bordoj du,
 plu, plu, plu!



Sopiro al ŝi

—laŭ ĉinesko *Longa sopiro*²

Kun korŝir'
 kaj suspir'
 mi dronas en maltrankvil'
 en ama april'.

La sopir'
 kun altir'
 de dezir'
 min pikas kiel rapir'.
 Ve, mi simpla vir'.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Aŭroro

—laŭ ĉinesko *Aŭguristo*³

Pitoreske jen
 lumas aŭroro.
 Poezias sentiment'
 en la memoro.

Neforgeseblas
 via favoro.

Ĝi estas ĉiam verva
en mia koro.

Aŭtuna vento

—laŭ ĉinesko *Pedanta klerulo*⁴

Susuras aŭtuna vent'
tra la firmament'.
Rigardas mi l' lunon
hele el orient'.

Freŝaero
floraromas
en ĉi moment'.
Sopiras hejmlokon
mi pense en silent'.

La abio

— laŭ ĉinesko *Moruskolektanta knabino*⁵

En fundo de l' ĝardeno
verda abi'
plaĉas al mi
dum natura depresi'.

Ĝiaj brakoj glimbrilas
kun energi'
kaj neĝglaci',
jen l' Adventa idili'.

L' abi' 'stas mia kunul'
dum vivsufer',
flagris esper'
kun ĝia fidelsincer'.

Scias l' abi', ke vintre
kun grizaper'
kaj frostsever',
venos baldaŭ primaver'.



Jadranka Miric (Serbio)

Homaro havas problemon

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*⁶

Aŭtuna
varmega veter'
ĵus surprizis nin ne nur
en klimao sur la ter'
same en aer'.

Ekfloris
ĉerizflortetoj,
fragojn ni rerikoltas.
Jen, akvomelonetoj
por donacetoj

en Aŭtun'!
Krom varmo de sun'
aŭtune en la mondo
okazis kaoso. Ĉu Lun'
savos mondon nun?

Dolore
rigardas ni fi-
militojn kie inoj
kaj infanoj suferi
daŭras. Hontu ni!

Tumultas
mondo. Timas mi
pro estonteco fia.
Ju pli kreskos esper' - ĉi
des pli ĝojos ni!

Malfrua aŭtuno

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*⁶

Novembre
sunas. Venteto
pelas nubaron milde.
Iu mezgranda nubeto
iĝis punkteto.

Malfrua
 aŭtuno varme
 salutas reflorantajn
 ĉerizojn kaj karme
 kaj feliĉlarne!

Tamen ĉi
 varma klimato
 baldaŭ ŝanĝiĝos. Vintro
 alvenos kiel kato
 dum malsato.

Surprize
 sed ventluleme.
 Aere vastiĝos la
 odoroj papileme.
 Por mi ĝueme!

Falis la
 unua neĝo.
 Tre ĝojiga vidaĵo.
 Ĉe fenestro sur seĝo
 mi en Di-preĝo.

1. Feniksa harpinglo (ĉine: chaitoufeng): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 1, 1*, 1* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bxbBB kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

2. Longa sopiro (ĉine: changxiangsi): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 3, 3, 7, 5 silaboj kun kontinua rimo.

3. Aŭguristo (ĉine: busuanzi): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.

4. Pedanta klerulo (ĉine: chaozhongcuo): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xxa,xa (x=senrima).

5. Moruskolektanta knabino (ĉine: caisangzi): ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

6. Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Laimundas Abromas (Litvio)



Mia najbaro Mateo

Kia estas la kortogardisto Mateo, scias ĉiuj, sed kia estas mi — vi tuj ekscios. Kvankam estos malfacile fidi tion, kion vi ekscios.

Estis aŭtuna tago, vendredo. Trans la riveron, malantaŭ la preĝejaj krucoj, post la supraĵoj de la arboj subiris la suno. La tago vesperiĝis. Post laboro mi sidis kun mia najbaro Mateo en la bierejo. Ni gustumis la bieron, almanĝante fromaĝon, kaj parolis pri diversaj aferoj.

—Ĉu vi scias, pro kio la araboj ne interkompreniĝas kun la ĉukĉoj? — parolis mi al Mateo.

—Ĉar araboj neniam renkontiĝas kun ĉukĉoj kaj ili ne bezonas tiun interkompreniĝon, — respondis al mi Mateo.

—Ĉu vi scias, pro kio la popoloj parolas diversajn, malsamajn lingvojn? — daŭrigis mi la interparoladon.

— Kulpas la Dio. Pro kio li lasis en la mondon tiom da multaj gentoj? Ĉu ne sufiĉus nur unu homa nacio? Vivus en la mondo ne germanoj, ne rusoj, ne ĉinoj, ne judoj, sed unu homa gento, parencaro. Vivus ili feliĉe kaj glorus la Sinjoron, — parolis Mateo kaj glutis la bieron.

— Ĉu vi scias pri la konstruado de Babela turo? — parolis mi kaj ankaŭ glutis iom da biero.

—Eble Ejfela turo? — ne komprenis Mateo mian demandon.

—Ne, —diris mi, — tio estis multe pli frue, antaŭ Ejfelo.

—Mi ne memoras, — diris mia najbaro, — eble tiam mi malsanis.

—Dubinde, — rediris mi. — Mi dubas, ke vi povis malsani tiutempe. Tamen tio ne gravas. Aŭskultu. Kion paroli pri la aliaj popoloj, se mi kun

mia Elena ne sukcesas interkompreniĝi. Kvankam, ŝajne, ni parolas la saman lingvon.

— Nur ŝajnas tiel, ke vi parolas la saman lingvon, — respondis mia najbaro. — Se al vi sukcesus konstrui tiun Babelan turon kaj via Elinjo estiĝos la mastrino en tiu turo, vi, Dominiko, iĝus mutulo.

— Ne pri tio vi parolas, Mateo, — kontraŭdiris mi. — Velksekiĝu mia lango, se mi diros, ke mi ne amas Elinjon. Mi tre amas ŝin. Ŝi ofte ripetas al mi, — „Ho, Dominiko. Vi diris, ke vi amas nur min“... Sed mi amas ankaŭ Esperanton. Verdire ĝi estas artefarita. Tamen ne tiom artefarita, eksmoda, se konsideri tiun aferon objektivite. Kiam mi pensas pri Esperanto, mi ne povas pensi pri ŝi, pri Elinjo.

— Ripetu, Dominiko. Blate mi ne komprenas. Vi malklare, ne kompreneble parolas, — ekinteresiĝis Mateo. Li glutis bieron, almanĝis fromaĝon kaj atente ekrigardis min.

— Mi amas Esperanton. Mi volas ĝin, mi deziras ĝin. Ĝi plaĉas al mi, mi ĝin agnoskas. Mi ĝin ne malŝatas. Nur ne edukita, malvirta, kolera, satmanĝinta kaj ruktanta ulo povas diri, ke Esperanto estas senutila, nebezonata. Ne inda atenton la afero. Senspirita kreaĵo. La bagatelajo. Por mi ĝi ne estas bagatelajo. Mi ĝin taksas bone. Mi ĝin estimas. Ĝi havas la guston – internan ideon. Vi sciu, geesperantistoj la internan ideon precipe bone taksas. Mi ne povas ĝin sakri. Des pli, ke mi ne emas miksi la lingvosciencan kun ideologio. Esperanton mi ne pretas kaj ne intencas perfidi. Eĉ penson mi ne havas pri tio.. Tio estas absurdo. La interna ideo — ĝi estas kvazaŭ la movo de animo. Kiel la amo al patrujo. Tamen mi amas ĝin. Tio ne estas la alternativo — Esperanto aŭ ideo. Tio estas demagogio, — mi glutis bieron kaj mallaŭte diris al najbaro. — Vi komprenu, Mateo, mi ne havas patrujon.

— Kial vi ne havas ĝin? — ne komprenis najbaro.

— Kiam mi pensas pri Esperanto, mi ne povas pensi pri io alia, nek pri mia edzino, nek pri la patrujo, — respondis mi.

— Denove Dominiko vi parolas blate, — nervoziĝis Mateo. — Ĉar ĉio tio — ne estas io alia. Tio estas la vivmaniero. Tio estas la vivo! Tamen nur la homo de laciĝinta intelekto koleras, nenion toleras. Li pensas, ke la sorto lin perfidis. Naŭvulo! Estas tiel, kiel estas, kaj tio estas bone.

Mi konfuziĝis, longe cerbumis, poste glutis bieron kaj diris:

— Tamen, tutegale, kiel vivi plu? La mondo ĉirkaŭa nin tretas, mokas, priridas, ne toleras nin — esperantistojn. Do, kiel vivi plu?

Mateo perceptis la gravecon de la afero. Li glutis iomete da biero kaj diris :

— Dominiko, vi nek vin gardas, nek aliajn kompatas. Ĉu vi ĉiam tiel kondutas? — demandis min Mateo. — Vi iru vian vojon kaj ne gravas, kion oni parolas pri vi. Oni parolis, parolas kaj parolos. Tia estas la vivo... Ne nervoziĝu. Vi havu vian opinion, viajn vivocelojn. Se estas loko, vi flanken puŝu viajn kubutojn! Se loko mankas, des pli — puŝu flanken la kubutojn... Malbonas via humoro — via persona afero... Kiam aperas la taŭga momento, flanken puŝu vi kubutojn. — Mateo glutis bieron, poste viŝis lipojn per maniko kaj plue parolis, — Se la edzino kaj politiko ne ŝanĝas la vivon, indas serĉi aliajn vojojn, — instruis min najbaro.

— Sed mi ne scias, kie serĉi tiun novan vojon, kie troviĝas ĝi? — mi parolis. — Mi ne havas kredon je estonteco kaj konfidon al mi mem.

— Mi petas kompreni min ĝuste, — instruis min Mateo. — Neniam postkuru trolebuson, aŭton, trajnon, katafalkon... La tempo neniam mankas, — morgaŭ denove estos hodiaŭo. Mankas nur prudento, sed tio estas ne via afero, sed de viaj proksimuloj, — ne nervoziĝu vi. En la vivo estas la loko por heroaĵoj. Se mankas loko, puŝu vi flanken la kubutojn.

Ni tintis per bokaloj kaj glutis bieron. La almanĝita fromaĝo bongustis. Poste Mateo daŭris paroli:

— Kompreneble, pro la objektivaj kaj subjektivaj kaŭzoj tio ne ĉiam realigeblas, sed tamen... Mi ne instigas vin ion fari. Entute tio estas

ia absurdo. Tutegale la rezulto aperas. Mi komprenas, la homo estas bona, sed malforta. Malgraŭ ĉio, ne mi decidu kaj juĝu. Ĉu vi komprenas, kion mi volas diri? Kaj vi puŝu flanken la kubutojn.

Mi aŭskultis, cerbumis, sed nenion diris. Nur nun mi ekzorgis, kio estas tiu vivo. Evidentiĝis, ke mi ne scias. Dum la tuta tempo mi pensis, ke la vivosenco estas la vivo mem: manĝi, labori, reproduktiĝi. Kaj jen, mi ne scias, kio ĝi estas? Tamen vivi oni volas ŝike, komforte. Por tio necesas la penoj, kiuj, verdire, jam komencas ĝeni la vivon. La rimedoj sufokas la celon. Nenio restas. Restas nur mi kaj mia panika timo.

—Estas mi, kiu nenion komprenas, — post longa cerbumado diris mi. — Pro kio aliaj ĉion komprenas, sed mi nenion, — mi koleris. — Mi mem ne komprenas, kion mi parolas, tamen mi scias, ke tio gravas.

— Kion vi, Dominiko, ne komprenas? —demandis Mateo min. — Mi ne diras, ke vi stultas, ke vi malsaĝas. Vivu vi dum vivas viaj malamikoj. Kaj neniam dormu, dum mankas ili. Estu vi pli bona ol aliaj. Estu vi prudenta. Vi ne permesu, ke oni trompu vin. La vortoj povas esti pereigaj kaj venenigaj. Ilia ripetado de tago al tago povas neniigi la personecon. Tamen iuj certaj vortoj povas turni la homon laŭ ĝusta direkto. Unue — neniam vi perfidu vin mem. Neniam kaj neniukaze. Ĉu vi komprenas?

Mi longe pensis, pripesis ĉion, diritan de mia najbaro Mateo. Kaj fine mi diris:

—Jes, mi ion komprenis. Mi serĉos por mi la lokon sub la suno, mi komencos la novan vivon.

—Ĝuste tiel, — diris Mateo. — La kubutojn vi puŝu flanken. Nur tiel!

Ni ĉion diris unu al alia, pro tio ni ĉesis paroli.

Ni intertintis per bokaloj, fintrinkis la bieron, almanĝis la fromaĝon kaj forlasis bierejon.



Pipi (Ĉinio)



Kvieta Riverbordo

Frumatene, tuj kiam la lampiroj elŝaltis siajn vostlampojn, matenruĝo leviĝis.

Ĉio vekiĝis de sia dormo. Vekiĝis homoj, bestoj, montoj, arbaroj, riveroj, insektoj ...

Vekiĝis ankaŭ la du birdoj, kiuj kovas ovojn nestante en la arbetaro ĉe la rando de la kanejo tuj apud la rivereto. Ili frotis la lacajn okulojn, larĝe oscedis, kun disfalditajflugiloj, al la suno leviĝanta oriente, kaj vigle kaj ĝissate spiris la freŝan aeron.

Nova tago komenciĝis. La ĉielo estis serena, la suno estis fajroruĝa, la vivo restis bela, kaj ili sin trovis tre feliĉaj kaj gajaj.

Post la matenmanĝo, la birdino diris al la virbordo:

“Laŭ miaj kalkulo kaj antaŭseno, post kvin tagoj niaj kvar idoj estos elkovitaj. Hodiaŭ matene estas via vico garde stari. Estu multe pli singarda dum la gardostarado, se io venos, tuj donu al mi alarmon per trifoja fajfado.”

“Bone, estu trankvila!” la virbordo ĝoje kapjesis kaj tuj flugis sur la altan kaj grandan arbon ne malproksime de la arbetaro por la gardostarado.

Tiaj ili ĉiam estis: alterne kovantaj ovojn kaj gardostarantaj. Ili havis bonan kaj klaran labordividon, nome ke kiam unu el ili kovis ovojn en la nesto, la alia staris garde sur la arbo.

Ĉe la rivereto estis tute pace kaj trankvile.

Kelkan momenton poste unu viro estis iranta laŭlonge de la bordo de la rivero direkte al la arbetaro.

La virbordo sur la arbo vidis de malproksime la viron kaj tuj fajfis tri fojojn al la birdino. Ĉe tio, la birdino tuj fariĝis nervoza kaj singarda kaj estis preta forlasi la neston en iu ajn momento.

La viro aliris al la arbetaro pli kaj pli proksime. La birdino jam de fore aŭdis la paŝbrulon pli kaj pli proksimiĝantan. Ĝi aplombe eliris el la nesto kaj tra la arbetaro eniris inter la herbojn apudajn.

Apenaŭ la viro preterpasis la herbojn, kie la birdino kaŝiĝas, abrupte la birdino kun granda bruo batante per siaj flugiloj flugis el inter la herboj en la aeron. Tio ĵetis la viron en panikon. Kun timokrio la terurita viro saltis posten unu paŝon. La birdino flugpendis en la aero antaŭ la viro nur momenton, kaj poste faligis sin peze kiel ŝtono sur la teron kelkajn paŝojn for de li, senĉese frapante per la flugiloj la teron kaj kun raŭka ĉirpo, tutkorpe konvulsiis, kaj dolore tordis sin, kvazaŭ baraktante en agonio. Ĉe tio, la viro volis senprokraste hasti antaŭen, supozante, ke ĝi estas grave vundita kaj faras la lastan spiron.

Sed ĝuste en la momento, kiam la viro estis preta fari unu paŝon antaŭen por kapti ĝin, kontraŭ ĉia atendo la birdino tuj leviĝis de la tero, pafiĝis en la aeron, kun frapo de la flugiloj kaj kun la rapideco de fulmo flugis for.

La viro ŝtoniĝis de mirego. Li buŝaperte staris senmova surloke, kaj longe okulsekvis la birdinon ĝis ĝi perdiĝis en la vasta kaj densa kanaro.

La viro estis tute konfuzita de la neatendita sceno. Post longa momento li rekonsciiĝis el stuporo kaj timo, foriris konsternita.

La virbardo sur la arbo klare vidis ĉion okazintan sube kaj subridis je la malsaĝeco de la viro.

La birdino haltis kaj ripozis sur la supro de la arbo meze de la kanejo. Post kiam la viro malaperis el la vido en la nebulan malproksimecon, ĝi ankaŭ ridis, dirante al si en la menso: "Kia malsaĝulo! Tio estas nur mia artifiko. Mi ne atendis, ke li vere estis trompita de mi!"

Post momento, la birdino reflugis, eniris en la arbetaron, sidiĝis en la nesto kaj kovis la ovojn kun trankvila koro. Baldaŭ ondo da dormemo atakis ĝin.

Ĉe la arbetaro denove restariĝis kvieto, krom ke gargare gluglis la roĵo karambolanta kun ŝtonoj dum sia fluado, kaj gaje murmuretis la folioj milde karesataj kaj kisataj de la matena brizo.

Vidante, ke la birdino restis kvieta en la arbetaro, la virbardo ŝtele flugis aliloken por ludi kun aliaj birdoj. Al ĝi malplaĉis longe restadi sur la arbo. Kiam ajn prezentigis okazo, ĝi dizertis de la posteno sen ke la birdino tion sciis.

Momenton poste, alvenis alia viro.

La paŝoj aŭdiĝis pli kaj pli klare. La birdino ne sciis, ĉu tio estas en sonĝo aŭ en duondormo, kiam ĝi aŭdis la paŝbrulon. Kvazaŭ subite pikita de kudrilo, ĝi tuj malfermis siajn dormemajn okulojn kaj streĉis la orelojn. Ĝi jam aŭdis la paŝbrulon pli kaj pli klariĝantan. Ĝi akre riproĉis en si la virbirdon: "La danĝero jam aperis. Kiel vi ankoraŭ ne donis al mi alarmon? Kio vin okupas nun? Ĉu vi distriĝas aŭ ...?"

La viro jam troviĝis antaŭ la arbetaro. Ĝuste en tiu ĉi kriza momento la birdino, ne hezitante plu, tuj rekte sagis el la arbetaro eksteren kaj ludis ĉe la viro la saman malnovan artifikon, kiam ĝi jam ludis ĉe la antaŭa viro.

Sed la viro estis saĝa kaj riĉa je scio kaj sperto. Li sentis nek timon, nek surpriziĝon, ĉar li bone sciis, ke tio estas la artifiko de la birdino por forlogi lin for de ĝia loĝejo.

Post kiam la birdino forflugis, la viro direktis siajn paŝojn al la arbetaro, klininte sin, permane ambaŭflanken dispuŝis la branĉetojn plenajn de domoj. Li disradiis ĝojon kiam li trovis sur la tero neston kun kvar ovojn en ĝi. Li al ili faris nenion kaj kuris hejmen en rekorda tempo.

Nelonge post la foriro de la viro, la virbardo, tre laca kaj elturmentita de la amuziĝo, reen flugis sur la arbon. Ĝi sciis nenion pri la okazintaĵo. Baldaŭ ĝi dormemiĝis. Pro timo, ke la birdino vidos ĝin dizerti, ĝi kaŝis sin inter densajn foliojn, kaj enfalis en profundan dormon, kun kapo kaŝita sub la flugilo.

La viro faris por la birdo kaptilon el ĉevalharoj, kaj poste tuj revenis al la arbetaro kun ĝi en la maldekstra mano kaj kun birdkaĝo en la dekstra. Koincide tiam la birdino ne estis en la nesto kaj la virbardo ankoraŭ estis ĝuanta tre dolĉan sonĝon kaj sciis nenion pri la alveno de la viro. La viro rapide metis la kaptilon ĉe la neston, poste fulme foriris, kaŝis sin post arbo en iom granda distanco kaj gvatokule atendis la birdinon refluĝi kaj eniri la arbetaron.

Post nelonge la birdino, serĉinte por si nutraĵon, reflugis sur la arbon, sur kiu la virbardo devus garde stari. Ĝi estis tre furioza kaj volis ordigi la

virbirdo la kapon pro tio, ke ĝi ĵus ne donis fajfadon, sed ĝi ne trovis la virbirdon kaŝiĝantan kaj profunde dormantan inter densaj folioj. Poste ĝi flugis de la arbo en la arbetaron. Ĝi ne rimarkis la kaptilon metitan de la viro. En la ĉirkaŭaĵo regis paca silento kaj ĉe la nesto ĉio estis en ordo kaj restis kiel antaŭe. La birdino sidiĝis sur la ovojn en la nesto, kaj baldaŭ la dormo ankaŭ eklulis ĝin.

Vidante, ke la birdino reiris en la arbetaron, la viro disradiis ridetojn, frotante al si la manojn pro ĝojo kaj murmuretante al si mem: "Hahaha! Vi baldaŭ apartenos al mi!"

Pasis longa tempo. Konstatinte, ke la birdino jam estis enirinta tra la kaptilo la neston, kun la kaĝo li alpaŝis al la arbetaro per paŝoj delikataj kiel tiuj de kato.

La virbirdo ankoraŭ troviĝis en la ŝtona dormo kun kapo kaŝita sub la flugilo kaj ne donis alarmon. Kun kurbigita dorso, la viro leĝerpaŝe estis alpremiĝanta al la arbetaro paŝo post paŝo. La birdino en somnolo nenion perceptis. Kiam la viro estis jam en la distanco de malpli ol du paŝoj de la arbetaro, li senatente surpaŝis velkintan branĉeton kuŝantan surtere. La abrupta kristala krako de rompita branĉeto vekis el la somnolo la birdinon, kiu, terure timigita kaj surprizita, sen perdi momenton disvolvis la flugilojn kaj intencis elflugi el la arbetaro, sed malsukcesis pro tio, ke ĝiaj flugiloj alkroĉiĝis al la ĉevalharoj. Ĝi superforte frapadis per la flugiloj kaj pene baraktis por sin liberigi.

Je tio, la viro senprokraste ĵetis sin antaŭen kun malfermitaj brakoj kaj kaptis ĝin sen granda peno.

Ondo da historiaj korŝirantaj akraj krioj de la birdino traŝiris la aeron, frakasis la trankvilon de la riverborda mateno kaj ankaŭ elŝiris la virbirdon el la morta dormo. Jam estis tro malfrue, kiam ĝi volis fajfi. Ĝi pentis, ke ĝi ne devis dormi tiel morte. Ĝia koro disŝiriĝis ĉe la vido, ke ĝia amata edzino falis en la manojn de la viro. Memriproĉo kaj rimorso pikis ĝin. Ĝiaj okuloj ĵetis fulmon. Ĝi tre volis, riskante sian vivon, ĵeti sin suben kaj repreni la birdinon el la manoj de la viro, sed ĝi rezignis la ideon ĉe la penso, ke la ovojn bezonas esti kovataj

kaj flegataj. Por la nekovitaj idoj ĝi estis devigata sufoki siajn koleron kaj doloron en la koro, kun larmoj en la okuloj.

La viro senhaste enkaĝigis la birdinon, kaj poste riparigis la difektitan kaptilon kaj fiksis ĉe la neston. Li bone sciis ke estas alia birdo, kiun li ankaŭ forte deziris enmanigi.

Tra la larmoj la virbirdo vidis ĉion faritan de la viro kaj ekkomprenis la insidan intencon de la viro. Plena de ĝojo, la viro iris hejmen kun la bela birdino. Survoje la birdino nekomprene demandis al la viro: "Sinjoro, mi jam estas en viaj manoj, kompreneble estas tute neeble por mi eskapi el via mankavo, sed io konfuzas min, kiel vi travidis mian artifikon kaj kiel vi sciis, ke en la arbetaro estas nesto?"

La viro respondis kun gaja grimaco:

"Mi volas sciigi al vi du aferojn. La unua estas: ne pensu, ke ĉiuj estas stultaj kaj povas esti tiel facile trompataj de vi. La dua estas: vi ne devis elflugi el la arbetaro kiam vi aŭdis miajn paŝojn. Por diri al vi la veron, se ne pro tio, ke vi elflugis el ĝi kaj ŝajniĝis vin morta, mi tute ne sciis, ke en la arbetaro nestas birdo kovanta ovojn."

Aŭdinte tion, la birdino tre pentis pri sia ago, sed estis jam tro malfrue.

Post la reveno hejmen, la viro donis al la birdino manĝaĵon, sed tiu ĉi rifuzis manĝi, eĉ ne ĵetis al ĝi unu rigardon, dirante: "Mi preferas morti de malsato ol manĝi vian manĝaĵon."

Kolerigita, la viro forĵetis disten la manĝaĵon, dirante en si: "Mi estas certa, ke vi malsatos. Mi atendas, ke vi petos de mi kompaton kaj manĝaĵon!" La birdino banis sin en siaj larmoj la tutan tempon pro pensado pri siaj karaj ovojn kaj edzo. Ĝi penis kalkuli en si, kiel ĝi povus elturniĝi el la embarasa situacio.

Longan momenton poste, kiam la virbirdo vidis ke la viro jam foriris, ĝi flugis de la arbo en la arbetaron. Kun forte batanta koro kaj kun granda singardemo ĝi evitante la kaptilon enŝoviĝis en la neston kaj daŭre kovis la ovojn kun streĉitaj oreloj kaj okuloj.

En la tagmezo de la sama tago, tuj post la tagmanĝo, la avidema viro refoje reiris por kapti la

virbirdon. Sed li ne sciis ke la virbirdo estas mirinde saĝa kaj prudenta.

Kiam la virbirdo de malproksime aŭdis la paŝojn pli kaj pli proksimiĝantaj al la arbitaro, ĝi ne disfaldis la flugilojn kaj tre singarde, nerimarkite elglitis tra la kaptilo el la nesto, kaj malaperis en la kanaron.

Estis nenio en la nesto krom kvar ovoĵoj, kaj la kaptilo restis tute sendifekta sur sia loko same kiel antaŭe.

La viro revenis hejmen, deprimita kaj trista, kun malplenaj manoj.

Tuj post la foriro de la viro, la virbirdo tra la kaptilo tre singarde reglitis en la neston kaj kovis la ovojn.

Frumatene en la sekvanta tago, la viro ankoraŭfoje iris tien por kapti la virbirdon, kiu, aŭdinte la kresĉendan paŝbruon, tuj senbrue forŝteliĝis.

La viro nenion trovis, kaj hejmeniris, ree kun kapo penda kaj kun nazo longa.

Ĉe la aŭroro de la tria tago, li denove iris tien provi la fortunon, sed nenion li rikoltis same kiel en la antaŭaj du fojoj.

La sopirego al la edzo kaj la baldaŭ elkovotaj idoj kaj soifo kaj malsato ekstreme turmentis kaj konsumis la birdinon. Ĝi malvigliĝis, malgrasiĝis, malfortiĝis, preskaŭ kolapsis, kaj la tutan tagon najlis sian rankoran kaj sombran rigardon ekster la kaĝon, rigide, senhelpe, dolore kaj malespere.

Vidinte ke la viro hejmen venis kun malplenaj manoj kaj kun malserena mieno en sinsekvaj tri fojoj, la birdino havis la senton, ke la virbirdo kaj la ovoĵoj estas sekuraj. Ĉe tio, ĝia sanganta koro konsoliĝis kaj ĝiaj zorgoj malpeziĝis, kvazaŭ peza ŝtono defalis de ĝia koro. En la sama momento brila ideo krepuskiĝis en ĝia kapo.

Ĝi alvokis al si la viron, almozuline petante:

“Sinjoro, jam de pluraj tagoj mi nenion manĝis, nun mi preskaŭ malsatmortos. Rapide donu al mi manĝaĵon, mi estas terure malsata!”

Aŭdinte tion, la viro tuj demandis kun longigita vizaĝo:

“Bone! Sed antaŭ ĉio permesu al mi meti demandon al vi: kial mi iris tien tri fojojn kaj ne vidis la alian birdon? Diru al mi kie ĝi estas?”

La birdino tuj komprenis, ke la viro celis eltordi el ĝi la informojn pri la virbirdo. Pripensinte iom da momento, ĝi respondis:

“Mi ne diru tion al vi, antaŭ ol mi kvietigos mian malsatan stomakon, kiu murmuris pro malpleno.”

Sen alia rimedo, la viro obeeme alportis manĝaĵon al la birdino. Tiu manĝegis.

Sate manĝinte kaj trinkinte, la birdino diris kun serena mieno:

“Sinjoro, multe pli bele kaj komforte estas ĉi tie, ol en la arbitaro, anstataŭ foriri mi decidis resti ĉe vi por eterne. Mi tre esperas, ke vi laŭeble baldaŭ kaptu la virbirdon, hejmen alportu ĝin kaj la neston kun la ovoĵoj, kaj metu ilin kune kun mi en la kaĝon, ĉar mi estas tre solece izolita kaj mizera kaj tre sopiras al ili. Mi ne povas malhavi ilin. Sen ili ĉe mi, mi nek ĝojas nek povas vivi bone. Se mi mortos de melankolio, vi havos nenion!”

Sur la trista vizaĝo de la viro tuj aŭroris rideto. Post mallonga konsidero, li sondtone demandis kun rideto ĉirkaŭ la buŝo:

“Birdo, mi eĉ ne scias kie estas la virbirdo, kiamaniere mi kaptos ĝin?”

La birdino respondis:

“Supozeble vi ne scias, ke la virbirdo ne reiros en la neston se ĝi ne vidos min! Plej bone estas, ke vi malfermu la kaĝon kaj ellasu min, por ke mi reiru kaj kunestadu kun ĝi. Mi garantias al vi, ke vi povos ne sole kapti nin ambaŭ per unu fojo, sed ankaŭ ricevi kvar idojn en la proksima estonteco, kondiĉe ke mi restos kun la virbirdo!”

Je tio, la viro tuj alprenis seriozan mienon. Kuntirante la nazon, li diris inter la dentoj:

“Vi, ruza kaj artifikema birdo ĉiam majstranta pri eltrovaĵoj, denove intencas ludi ĉe mi malpurajn artifikojn? Ĉu vi celas forsavi vin? Mi ne kredas viajn vortojn, ankaŭ mi ne lasos min trompi de vi! Ĉesu kun via ruzaĵo!”

La birdino serioztone diris:

“Vi ne bezonas havi skrupulon. Tio, kion mi diris al vi, estas vere el mia bonfaremo kaj tute celas vian

bonon. Mi intencas nek artifiki, nek trompi vin. Mi havas idojn ankoraŭ ne elkovitajn, mi ilin tre amas kaj estas kovanta, kiel mi povas forsavi min sen zorgo pri ili? Bonvolu forpeli ĉiujn dubojn!"

La viro estis avidulo. Granda avideco ekregis lin. Sur lia vizaĝo baraktis dubo kaj hezito. Jen gratante sin post la orelo, jen frotante al si la frunton, li maĉis kaj remaĉis la vortojn de la birdino, sentante, ke ili ŝajnis tute kredeblaj. Pesinte la gajnojn kaj la perdojn, fine li cedis al la propono de la birdino.

"Bone! Mi konsentas forliberigi vin!" la viro dejetis de si la seriozecon kaj diris kun malica rideto. "Sed se vi aŭdacas trompi min, mi iros disrompi viajn ovojn kaj malkonstrui vian neston!"

"Komprenite! Faru, kion vi volas!"

Fine la buŝa interkonsento estis tiel farita post longaj marĉandoj.

Antaŭ la forflugo, la birdino foj-refoje avertis al la viro:

"Kara sinjoro, nepre memoru: vi iru kapti nin ne pli frue, ol post du tagoj, alie, vi nenion akiros. Adiaŭ!"

Ĉe la lastaj vortoj, la birdino forflugis kiel sago direkte al la riverbordo.

La viro ne sciis, ke la ovoj krevos kaj la idoj elkoviĝos post du tagoj.

Frumatene post du tagoj, la viro leviĝis tuj kiam la koko kokerikis la unuan fojon. Turmentata de longa atendo, sed ebria pro dezirego, la viro kun malplena kaĝo sagis tien por kapti unufoje la du birdojn, plena de espero kaj ekscito.

Sed je lia desapontiĝo la du birdoj estis for kaj en la nesto nur postrestis rompita pecoj de ŝeloj. La kaptilo restis tute netuŝita kaj sendifekta sur la loko same kiel antaŭe.

Antaŭ kelke da horoj la ovoj jam krevis, kaj la birdidoj elŝeliĝis, sin forsavis, kaŝiĝis inter herboj.

La viro ĉirkaŭkirliĝante apud la arbetaro kaj ĉirkaŭrigardante traserĉis la du birdojn en ĉiuj anguloj dum longa momento, sed li nenion trovis.

Frapante al si la kapon, la viro subite ekkonsciis, ke li estis trompita de la birdino. Li falsidiĝis senluziiginta teren. Senlima pento forte ronĝis lin. Kun larĝe malfermitaj okuloj, li turnis la rigardon,

jen de la malplena nesto al la malplena kaĝo, jen de la malplena kaĝo al la malplena nesto, kaj poste li eksplodis en ploron, senĉese batante permanplate la teron.

Tamen la du birdoj sur la arbo en ne granddistanca loko tre klare kaj melodie fajfis, ĝoje kaj gaje dancis svingante sin tien kaj reen.

Kaplevinte, je la ekvido de tiu sceno, la viro, obsedata de pento, freneze ŝiris al si la harojn, batadis al si la bruston, tordis al si la manojn, kaj svenis de kolero.

Depost tiam, anstataŭ en la arbetaro la du birdoj konstruis sian neston inter la branĉoj de alta arbo aŭ en la krevajoj de la roko aŭ en la kaŝejo de la rokkrutaĵo. For de ajna danĝero kaj minaco, ili vivis vivon liberan kaj senzorgan, ĝojan kaj plezuratan, kiel ĉe la brusto de Dio.



Zhang Changsheng (Ĉinio)



Moderna aŭ tradicia

recenzo pri la lernolibro *Moderna Esperanto*

Ekde la somere 2007 ĝis nun la plej furora Esperanto-lernolibro en Ĉinio nomiĝas *Moderna Esperanto* ĉinlingva, kompilita de s-ro Weilun Li, la hispana vicprofesoro de Pekina Lingva kaj Kultura Universitato. Preskaŭ ĉiuj ĉinaj lernejoj uzas ĝin kiel bazan lernolibron. La libro inkluziva de 2 volumoj ja estas kompleta. Ĝi celas komencantojn kaj gvidas la lernantojn ĝis la komenco de la nivelo B2. La libron akompanas ankaŭ sonodosieroj de ĉiu leciono kaj kun novaj vortoj. La lernilo havas bazajn vortarojn Esperanto-ĉinan kaj ĉina-esperantan, notojn de la teksto, eksplikojn de gramatiko, kaj ekzercotipojn

koncerne al la tekstoj, kio prezentas interligiĝon kaj asociadon pri ĉiuj lecionoj.

Komence en la libro videblas, ke ĝi estas moderna, ĉar ni vidas, ke ekzistas aferoj kiel ekz. La ŝanĝo de la antaŭe uzita esprimo *gekamaradoj* (kreaĵo de la kutura revolucio en Ĉinio) al la nuntempa esprimo *gesinjoroj*, kaj ke aperas en la tekstoj la nocioj kiel interreto, komputiloj, retumadoj. La libro estas strike kunligita al la sondosieroj tra la tuta libro, ne nur en la komencaj lecionoj. La sondosieroj estas bona modelo de la lingvo, ili estas voĉlegitaj de elstaraj geparolistoj de Ĉina Radio Internacia. La stilo de la libro laŭ la metodo gramatika-traduka ebligas al la lernantoj mem malkovri la funkciadon de la lingvo. La ekzercotipoj estas tiuj, kiuj ebligas al la lernanto per indukta vojo kompreni la strukturon de la lingvo. Gramatiko estas instruata ne nur per specifaj tekstoj, sed gramatikaĵoj kaj ankaŭ kulturaj informoj estas disversitaj inter la lecionoj. La fokuso de la libro iras al la kompreno, deĉifrado, analizado de la tekstoj. La lernado de la novaj vortoj okazas baze de dulingvaj vortlistoj, helpe de la notoj kaj la eksplikoj tra alproprigo kaj memorigado. La tipaj gramatikaĵoj kaj tradukendaj tekstoj estas eksplicitaj, akompanataj de vortlistoj, plej ofte dulingvaj kaj la tekstojn sekvas ambaŭdirektaj tradukekzercoj. Ene de tiu libro la asertoj estas laŭeble plej akurataj, precizaj kaj seneraraj en produktado de la lingvaj elementoj, kaj en kompilado de frazoj kaj tekstoj. Ĝuste por tiu celo la ĉeesto kaj la gvida rolo de la instruisto estas necesa (tial lernejoj uzas ĝin kiel lernolibron), ĉar la instruistoj respondecas pri la korektado de eraroj, plibonigo de la niveloj kaj strebo al perfekteco.

Gramatiko estas instruata laŭ la dedukta vojo. Tio signifas, ke unue estas instruataj la modeloj kaj strukturoj kaj poste devas okazi ilia rekonado, kompreno kaj praktikado pri

la frazoj kaj la tekstoj. Ene de la tekstoj la frazoj estas la kerno kaj bazo de la libro. La leciontekstojn sekvas gramatikaj resumoj, listo de ekzemploj, samtemaj ekzercoj. La tuta gramatika sistemo estas instruata laŭ strikta strukturo, antaŭplanita sistemo. Oftas, ke estas devige parkere, eĉ papage lerni kompletajn listojn de afiŝoj, vortfarado, vortospecoj, pri uzo de akuzativo kaj tabelon pri pronomoj ktp.

Resume, *Moderna Esperanto* estas utila al Esperanto-instruado en lernejo, eĉ ankaŭ al memlernantoj. Ĝi havas ne nur la kompletan eksplikoj pri gramatikaĵoj, sed ankaŭ ekzercojn kaj ekzercoŝlosilojn en la fino de la libro, kaj la sondosierojn por prezenti modelan elparoladon de novaj vortoj, tekstoj. Fine, la vortareto aperigita en la tekstoj estas menciita. Ĝuste pro tio, multaj ĉinaj komencantoj preferas elekti la libron kiel sian unuan lernolibron, kiu vendiĝas kiel *varmaj bulkoj*.

La ĉefa manko, laŭ mia opinio kaj praktiko dum mia instruado, estas ke la materialoj tro koncentriĝas je la komprenigo kaj tradukigo, dum ne sufiĉas ekzercoj pri gramatiko kaj ĝusta uzo de vortoj, la ekzercoj kaj praktikigoj de aŭdkompreno kaj parolado. Pleje mankas la sondosieroj por la ekzercoj. Aliflanke la libro profitigas precipe komencantojn kiuj jam havas la angllingvan bazon, ĉar multe da terminoj kaj konceptoj estas enkondukitaj de la angla lingvo. Kvankam la lernilo ankoraŭ ne estas tiel perfekta kiel ni esperas ian lernilon, kiu povas adaptiĝi al la progresintaj metodoj en la mondo, tamen nun la libro certe estas populara kaj bonvena al ĉinaj komencantoj.

2023.10.28



Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)
www.elfino.cn/penseo/penlisto.htm

